

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№ 11

Novembro, 2012



Kara nia Leganto, ora oktobto mansvinge adiaŭis nin, kvankam varma aŭtuno ankoraŭ regas en Ŝikago. Oni prave diras, ke tie ĉi estas observataj tri sezonoj, kiel vintro, somero kaj aŭtuno, sed pli ĝuste – nur du: vintro kaj voj-renovigado. Tio ne estas cinika ŝerco, sed kruda konstato de jam okazintaj faktoj de ŝikaga veter-observado. Kiel diris la unua prezidento de la nuntempa Ukrainio L. Kravĉuk: “Ni posedas tion, kion ni ekhavis”. Ĉu iu povas ŝanĝi ion en ĉi vivo, kion promesis aganta prezidento de Usono, ĉiuminute ripetinte cigane pri iu “ŝanĝo”? Sendube – ne!, same kiel neniu povas halti funkciadon de la E-societo de Ŝikago. Se nia bulteno aperadas, do, funkciadas nia E-kolektivo! –La Redakcio


“Verda” Besta Bieno



Kial mi elektis ĉi temon por la nuna kunsido de nia E-societo? Do, la respondo estas ege simpla: ĉi jare oni festas la 65-an datrevenon de la plej unua traduko de G. Orwell-a fabelo “Animal Farm”, kiu aperis en (mia gepatra) ukraina lingvo. La traduko estis farita kaj aperis en tendaro por rifuĝintoj en postmilita Germanio sub la titolo “Kolĥozo de bestoj”, aŭtoris ĝin 24-jara Igor Ŝevĉenko – unu el fondintoj de ukrainologia fako en Harvarda Universitato (Usono) kaj fama esploristo de bizanca epoko. Traleginte originalon en 1945, li estis impresita, kiel vere Orwell priskribis tion, kion travivis ukrainoj sub stalina diktaturo. Laŭ peto de la tradukisto la aŭtoro verkis antaŭparolon, kiu estis poste tradukita en preskaŭ ĉiuj lingvoj de tradukoj. Tiu Ukrainlingva eldono estis frua propaganda uzo de la libro. Ĝin oni presis por distribuado inter la Sovetaj civitanoj de Ukrainio, kiuj estis iuj el la multaj milionoj da delokitaj personoj tra Eŭropo ĉe la fino de la Dua Mondmilito. La Usonaj okupantaj fortoj konsideris tiun eldonon presita per

kontraŭleĝaj presiloj, kaj transdonis 1,500 konfiskitajn ekzemplerojn de Besto-Bieno al la Sovetaj aŭtoritatoj. La politiko en la libro ankaŭ afektis Brition.

La “fabelo” estas satira alegorio je t. n. Rusian revolucion de 1917 kaj epoko de Stalin (en fabelo – virporko Napoleono), konstruado de la nova socio sur la idologia bazo de maksismo-leninismo (“animalismo”). Mortanta virbovo Olda Majoro (K. Markso) testamentas al bestaro de



aparta farmo forpeli la mastronposedanton kaj fondi bestan (proletan) respublikon. Antaŭ sia forpaso li nur sukcesis finkanti bestan Internacinalon “Bestoj Anglaj”:

Bestoj anglaj, kaj irlandaj,
ĉiu best’ en ĉiu land’
nun aŭskultu, nun aŭdiĝas
al vi ĉiuj ĝoja kant’.

Baldaŭ estas iun tagon
faligota l’ homtiran’,
kaj neniam plu Anglion
suferigos lia man’.

Niaj nazoj ne plu portos
liajn ringojn de sklavec’,

disfaligos direktilojn,
kaj vipaĉojn la pravec’.

La riĉaĵoj estos niaj:
pajl’, sukero kaj farun’.
Ĉio bela, ĉio bona
apartenos al ni nun.

Belaj estos anglaj kampoj,
bela ankaŭ la akvar’,
kaj la bestoj liberig’os
ne ĉi-vivo de amar’.

Jen por tio ni laboru
ja per ĉiu fortocer’,
ĉiu bruto, ĉiu besto
por estonta la liber’.

Bestoj anglaj, kaj irlandaj,
ĉiu best’ en ĉiu land’
disvastigu mian kanton
ĉar ĝi estas via kant’!

Teorion de Olda Majoro evoluis praktike liaj sam-gentanoj – porkoj, kun helpo de novnaskitaj kaj novmode edukitaj hundoj (sekreta polico ĈK en Rusio-Sovetio). Potencon de novbakita bieno ekkaptis porkaj ĉefuloj Napoleono k Neĝbulo (supozeble: Stalino k Trockij). G. Orwell antaŭvidis ankaŭ 12-paragrafan



“Moralan Kodon de la Konstruanto de Komunismo” (akceptita nur en 1961), kiun li nomis biblie “Sep Ordonoj”:

1. Dupieduloj estas malamikoj.
2. Kvarpeduloj kaj flugilhavuloj estas amikoj.
3. Neniu besto portu vestaĵojn.
4. Neniu besto dormu en lito.
5. Neniu besto trinku alkoholaĵojn.
6. Neniu besto mortigu iun ajn alian beston.
7. Ĉiuj bestoj estas egalaj.

Fakte, dum funkciado de la “Besta Bieno” reguloj transformiĝis, ekzemple, al 5 paragrafo oni aldonis “superflue”, al 6 – “sen kialo”, al 7 – “sed kelkaj bestoj estas pli egalaj ol aliaj ktp. La “respubliko”, krom la himno, posedis ankaŭ standardon: sur E-fono estis krucigintaj hufo kaj korno (martelo kaj serpo, ĉu?).

La formato de ĉi eldono ne permesas transdoni la ĉefan parton de la prelego – traduko de propraj nomoj en 7 lingvoj. La aŭtoro sincere dankas pro la halpo k kontribuo al E. Rodari (Milana E-societo, pro itala traduko), A. Emmerich (Germana E-Asocio, pro germana traduko). Esperanta traduko estas pruntebla de libraro de la E-societo de Ŝikago. –V. Pajuk, C. T.

Esperanta Ponto

Okaze de 125 Jaroj de Esperanto la 3-an de oktobro 2012 Konsilio de Urbo Bydgoszcz decidis honorigi la la gravan datrevenon per nomigo de ponto-konstruaĵo trans rivero Brda en Bydgoszcz “Most ES-



PERANTO”. La 27-an de oktobro 2012 okazis oficiala malkovro de du tabuloj kun surskribo “Most ESPERANTO” je ambaŭ flankoj. Festparolis Stefan Pastuszewski – Prezidanto de Komisiono pri Stratnomigo en la Urbo Bydgoszcz, kiu substrekis, ke Ponto de Esperanto estas ankaŭ Ponto de interkompreniĝo inter homoj de diversaj nacioj, lingvoj kaj kulturoj. La ceremonion partoprenis kelkdek personoj el Pollando kaj gastoj el Germanio, Kazakio, Rusio kaj Senegalo. –A. Grzębowski

Zamenhofa Festo’2012, Kie?

Ĉi jara solenaĵoj okaze de Zamenhofa tago okazos en Fisher Building – 84-metra nov-gotika konstruaĵo, lokita je adreso 343 Suda Dearborn strato (apud blu-linia stacio “Jackson”). La 18-etaĝa domo estis fin-rektigita en 1896 fare de D. H. Burnham & Kompanio laŭ komisiono de Lucius



Fisher, en 1907 estis aldonitaj 2 superaj etaĝoj. Nun ĝi estas la plej malnova (ne malkonstruita) domo en Ŝikago, en 1976 ĝi estis aldonita al National Register of Historic Places. Fasado de la konstruaĵo estas ornamita per figuroj de fiŝoj, kraboj, ankaŭ – de agloj, drakoj kaj aliaj mitaj kreaĵoj.

Dankon Jon!

Estraro de la Esperanto Societo de Ŝikago elkore dankas samideanon Jon Willarson pro la senavara donaco de \$100. Imitinda ago!

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O’Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

26an de Novembro – Uzbekaj novaĵoj de Andreo Kolganov

16an de Decembro (Dimanĉe)–
Zamenhofa Festo en Fiŝista Nesto, 343 S. Dearborn St., inter tagmezo kaj 4 ptm en klubejo sur la 19a etaĝo.